

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO



*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*

Ĉiam pli da kulturo...

Vidu paĝon 8



el
Vinilkosmo



Poèmes de Pablo **NERUDA**

Musique de Mikis **THEODORAKIS**

CANTO GENERAL

Eglise Notre Dame de la Croix
Dimanche 19 juin 2011, à 15h30
69, rue de Ménilmontant – 75020 PARIS
M° Ménilmontant – **ENTRÉE LIBRE**



Le chœur inter-régional **INTERKANT'**, ainsi que ses musiciens vous invitent à vibrer au rythme de la révolte des peuples opprimés d'Amérique du Sud, sous la direction de **FRANJO LÉVÉQUE**

Ne mal-trafebla !



(paĝon 14)

« **ĜENERALA KANTO** » : les textes de Pablo Neruda ont été traduits en langue internationale Espéranto par Georges Lagrange

el **SAT-EFK**

INDIGNU!

**Plu moviĝas la Movado
Kinŝaso (DR Kongo)**

**Konga Esperanta
Virina Asocio
K.E.V.A.**

Akcepto de esperantistaj Europanoj ĉe KEVA.

La 23an de aprilo 2011, estis fermo de la esperantista seminario kiu okazis en Kinŝaso, la ĉefurbo de nia lando. Dkea pli parolos pri tiu evento eble poste.

Sed ĉi tie ni parolos nur pri vizito de karaj Andrea Bertrand el Francio kaj Alain Delmotte el Belgio ĉe KEVA je la fino de la seminario. Do, la akcepto okazis en la provizora sidejo de KEVA apud la paroko *Sankta Ignace*, posttagmeze.

Bela momento! Unuafoje KEVA akceptis geesperantistojn. Ili precipe estis la unuaj personoj skribantaj vortojn en la orlibro de KEVA. Kara Andrea virino tre afabla kaj bona instruistino ne hezitis diri vortojn al la KEVAanoj por kuraĝigi la virinojn daŭrigi en tia vojo por plibonigi la vivkondiĉojn de la virinoj. Feliĉe, la infanoj de KEVA prezentis al la eŭropanoj donacojn por ili kaj por CERL el Francio. Ankaŭ la KEVA-prezidanto prezentis al la infanoj kaj al ĉiuj KEVAanoj la donacojn kiujn S-ino Andrea alportis el Francio por KEVA infanoj.

Poste, KEVA kaj eŭropanoj ĝojis kun malgrandaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

La KEVA-prezidanto, f-ino Nelly Masemi, ankaŭ prezentis la KEVA-dokumentojn (el kiuj, kajero de la membroj, kajero de kontoj) al s-ino Andrea por vidi laŭ kia maniero tiu virina agado funkcias. La du virinoj konsentis precipe pri agadoj (naturprotektado kaj agrikulturo); do laŭ Nelly, la agrikulturterenoj estas disponeblaj en Popokabaka kaj Lukala ĉar ŝi jam kontaktis la terĉefojn sed mankas ebleco por aĉeti aŭ lui tiujn terenojn. Same pri la tereno por konstrui orfejon en Popokabaka. Do KEVA funkcias per siaj kotizoj kiuj ne sufiĉas ĉar ĝi devas havi la permeson de la konga registaro por bone lanĉi laborojn ĉie kie ĝi jam ekzistas. Ni finis nian momenton kun kelkaj fotoĵoj kiujn vi vidas. kaj kelkaj virinoj elsendis mesaĝojn tra la mikrofono de la nacia konga radio (RTNC).

NB: Karaj legantoj, KEVA volas okazigi esperantistan seminarion nur pri formado de la virinoj kaj infanoj la venontan jaron 2012 en julio. Pri tio, ni petas al ĉiuj volontuloj, bonvolu akcepti instrui la partoprenantojn en nia lando DR Kongo kiel karaj Andrea kaj Alain faris. Ankaŭ tio ne estos facila sen financa helpo. Do, la kunlaborantoj de KEVA aŭ Nelly, ni petas al vi subtenon por ke la evento okazu pli bone. Bv. ankaŭ sendi ĉe KEVA viajn proponojn se tio plaĉas al vi.

kontaktoj: nelly_masemi@yahoo.fr; KEVAkongaesperantavirinaasocio@yahoo.fr

Dankon al ĉiuj legantoj.

Farite en Kinŝaso, la 28an de aprilo 2011

**S-ino NTONSHI AWER Perpetue
F-ino MASEMI MBEMBI.E.Nelly**

**Gvidantino pri KEVA informoj, Prezidantino de KEVA.
kevakongaesperantevirinaasocio@yahoo.fr**



Flore kuku ! Fraga ĉarloto

En majo, estis la tria datreveno de la naskiĝo de «Flore kuku!». Al la demando: «Kial ses kandeloj por festi tri jarojn?», Flonjo rebatis: «Kial ĉiam ĉikani kun la unuoj? Kuirarto estas nek matematiko, nek fiziko.»

Recepto, paĝon 10.



Kongresi en 2012, jes !

Sed kie ?

En Seto, okaze de la tria laborkunveno, kun kontentaspakta rideto, **Ĵak Le Puil**, anoncis la kandidatecon de **Burĵo** (18 Bourges) kiel kongresurbon 2012. Alia ebleco estis **Greziljono**, kondiĉe ke homoj sin prezentu por grasigi la ĝis nun tre magran teamon (kvankam entenantan sufiĉe diketan anon). Ĉar eĉ ne unu mano leviĝis post alvoko al tiu grasigo, sendileme elektiĝis Burĵo.

Solanĝo (*Solange Van Landeghem*) jam preparis la aferon, kaj ĉefe ricevis antaŭ la kongreso principan konsenton de la Burĵa **CREPS** (Centro Regiona pri Edukado Populara kaj Sporta)...

Sed ve, ho ve ! Ne nur la aŭtomobilo de Solanĝo paneis nur kelkajn kilometrojn for de ŝia domo survoje al Seto, sed plie dum la kongreso, CREPS ricevis peton de iu tablotenisista organizo, kiu luprenis la lokojn anstataŭ ni...

Ja, CREPS ne perfidis nin, ĉar temis nur pri principa konsento, sen firma lupreno, plie CREPS direktiĝas prioritare al sportaj organizoj, kaj eĉ se ni estus jam subskribintaj kontrakton, oni povas imagi ke tiu kontrakto entenintus paragrafon, kiu ebligis ĝin nuligi, kaze de sportorganiza peto.

Notu tamen ke asocio kiel la nia kongruas kun la celoj de CREPS: ĝia sesa celo (el sep) tekstas tiel: «partopreni en la disvolvigo de la sociala komunikado». Ja nia moto estas «pour une culture sans

frontière» sed, se anstataŭ kolombon ni estus elektintaj futbalpilkon kiel simbolon, ni eble estus pli bonŝancaj !

Do jen la situacio: En Greziljono estas lokoj sen teamo, en Burĵo teamo sen lokoj. Troa distanco inter Burĵo kaj Greziljono malebligas plani, ke Burĵa teamo zorgu pri kongreso en Greziljono, eĉ malpli ke Greziljona kastelo migru al Burĵo...

Se ni volas kongresi en 2012, ni trovu lokon !

Kongresejo simila al tiu de Seto estas modela: ĝi entenas kaj kunvenejojn, kaj dormejojn kaj manĝejojn, kaj ĉefe, ne tre multekosta.

Se vi konas iun tian en via regiono, nepre indiku ĝin, ne timante ke oni trudu al vi partopreni en la ebla onta organiza teamo: kun tiaj kongresejoj ĉion entenantaj, eblas organizi eĉ ne estante konstante surloke. (Tio ne valoras por Greziljono, la kastelo per si mem ne povas ricevi tutan SAT-Amikaran kongreson, do oni devas kunigi kaj kunordigi la eblecojn kun pli ol kvar aliaj organizoj, kaj jen kio necesigas lokan teamon)

Serĝ' Sir'
nome de la komitato

... kiu preferas fari unutagan membrokunvenon ol multekostan senOKkan tritagan kongreson (ja nepras havi minimuman lokan Kongres-Komitaton, eĉ se ĝin eblas multe helpi defore), kaj atentigas ke necesas do antaŭvidi tri/kvar venontajn kongreslokojn jam ekde nun.

Enhavo

SAT-Amikaro	
Kongresi en 2012, kie ?	3
Kasista rubriko	4
Ĝeneralaj informoj	7
Ni funebras	12
SAT	
Ĝeneralaj informoj	7
Kongreso en Sarajevo	11
Analizoj/opinioj	
Vivo de pacisto	4/5
La mano	6
Lingvo	
Kiel traduki : Point (dua parto)	7/8
Legindaj legendoj	10
Libro-servo	
Novaĵoj	1, 8
Recenzoj	
Gaza-strophe	6
Libro vivas pli longe ol unu sezono	9
Diversaĵoj	
Flore kuku	2,10
Humuraĵoj-distraĵoj	
Selle-humuraĵoj	4,6,10
HuMorelaj Linioj	10
BD: Post la lago, La Tribuloj 1	16
Kursoj/staĝoj	
Greziljono, Kvinpetalo, Esperanto-Nord	13
Plu moviĝas la Movado - Le Mouvement en mouvement	
Interkant' en Parizo	1, 14
Akcepto ĉe Keva	2
Ni renkontiĝis en Seto	12
Kunlaborado en San-Briego	13
Albiĝo, Fontano, Chateauroux, Nilvango, Heruvilo...	14/15
Ĉaŭdefono : Omaĝe al C. Gacond	16

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépôt légal à parution.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo. **Enpaĝiganto** : Serĝo Sir'. **Redakt-kaj korekt-skipo** : Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', **kun helpo de**: Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos, Lino Markovo.

Partoprenis en ĉi numero: Andreo Andrio, Elizabet' Barbay, Robin Beto, Michèle Freud, Pierre Grollemund, Mirejo Grosjean, Bruno Henry, Klod, Flora Markov, Michel Marko, Guy Martin, Nelly Masemi, Lin' Morel, Claude Nourmont, Yves Nicolas, Perpetue Ntonshi, Laurent Peuch, Arlette Plutniac, Ĵak Le Puil, Serĝo Sir', Juliette Ternant.

Kontribuaĵoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto : lasago@free.fr

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ de préférence par internet, **textes** en format RTF ou TXT pour un document joint, et **images** en format TIFF, JPEG ou GIF.

■ éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.

■ Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Plu moviĝas la Movado
Ĉaŭdefono
(CH-La Chaux-de-Fond)

Festotago honoru kaj omaĝe al **Claude Gacond**

Sabate la 27an de Aŭgusto 2011, en la urba biblioteko de **La Chaux-de-Fond**, Progrès 33, 2300 La Chaux-de-Fond, Svislando.

Claude Gacond estas fama svisa esperantisto. Instruisto, pedagogo, li fondis arkivejon Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la jaro 1967. Poste li fondis Kulturajn Centron Esperantistan (KCE) en 1968 en *La Sagne*, ekde 1974 tiu Centro staras en *La Chaux-de-Fonds*. Duontempe li instruis, duontempe li agadis por KCE kaj CDELI.

Ekde 1994 li dediĉas siajn fortojn al CDELI en la Urba Biblioteko. Inter 1962 kaj 1992 li estis parolisto ĉe la esperantofako de Svisa Radio Internacia en Berno. Li estas redaktoro de SESinformas, la bulteno de Svisa Esperanto Societo.

Claude Gacond estas honora membro de UEA, de SES kaj de ILEI. Jen vi legis resumon de liaj multnombraj aktivecoj en la esperanto-movado.

Festolibro aperos kaj estos solene transdonata al Claude dum la festotago.

Programo de la festotago:

Akcepto en CDELI salono ekde 9h30.
Komenco de la solena festotago en la aŭlo: 10h30.
Aperitivo: 11h30 kun salutvortoj diversaj.
Tagmanĝo en restoracio Citérama: 13h00.
Solena festotago, dua parto, en la aŭlo: 15h00.
Fino de la ceremonio: 16h30.
Plua renkontebla en CDELI salono ĝis la 17h30.

Por mendi la festolibron, oni rilatu kun la eldonejo **Ittis** per jena adreso: editioniltis@aol.com.

Por partopreni, alparoli la festantojn, kanti aŭ deklami, partopreni la tagmanĝon (prezo ĉirkaŭ CHF 30), oni anoncu sin al **Mireille Grosjean** (mirejo.mireille@gmail.com, 0041 79 69 709 66)

Por restadi antaŭe aŭ poste kaj tranokti kaj partopreni la postfestan programon, oni anoncu sin al **Claude Gacond** (gacond@bluewin.ch, hejme 0041 (0)32 926 52 32, CDELI 0041 (0)32 967 68 42)

Postfesta programo: Amika renkonto, kiu ebligas reciprokan konatiĝon. Tiucele Claude elektis agrablan kunvenejon en la hotelo *Von Bergen* situanta en *La Sagne*, vilaĝo najbara al *La Chaux-de-Fonds*. Detaloj troveblas sur la retejo www.esperanto-gacond.ch kaj sinanonco per la retadreso gacond@bluewin.ch.

Foto: Wikipedia, Stefano Keller



Claude antaŭvidas por la sabato postfestan manĝon kaj amikan vesperon. Kaj dimanĉe, inter la maten- kaj tag-manĝoj eble en ĝardeno okazos interŝanĝaj kontaktoj. Kaj posttagmeze, kiuj ne tuj forvojaĝos, tiuj intimiĝos promene kun siberia pejzaĝo torfeja antaŭ ol frandi fonduon aŭ kamparanan teleron. Kaj vespere kontakto kun iama lernantino malkovrigos ŝian manieron spione filmi birdojn. Kaj lunde, post tiu kamparana aventuro, Claude estos en CDELI por vizito de tiu dokumenteja. Eblas akiri brokantaĵojn librajn kaj revuajn.

Mirejo Grosjean,
kunprezidanto de Svisa Esperanto Societo

La Tribuloj -1-

Post «Ĉe la lago»: Cedante al la ĉarmoj premoj de la patrino, mi publikigas la delirajojn de ties filino...

Serg'

